

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la disvolviĝo de la mondanistaj ideoj.

*Ne povas ekzisti nacia sekureco sen monda paco, monda paco sen internacia justeco, internacia justeco sen monda juro kaj monda juro sen institucioj, kiuj ĝin kreas, interpretas kaj aplikas.*

Tiu sekvo de konstatoj bone priskribas la ideojn de la mondfederalistoj. Mi tradukis ĝin el interesa numero de la franclingva revuo *Monde Uni* [Unuiĝinta Mondo], numero dediĉita al panorama vido de la historio de la mondanismo. Ni profitu pri tiu laboro por ekzameni dum kelkaj elsendoj, kiel progresis tra la generacioj la sento pri mondcivitaneco.

Ankoraŭ tro fruas por povi skribi historion de la mondanismo. Nur tempo-malproksimiĝo permesos prijuĝi, kiel disvastiĝis la ĉefaj ideo-fortoj, kiuj kondukis al la fondo de Ligo de Nacioj, kaj poste al tiu de Unuiĝinta Naciaro, kaj kiuj kondukas hodiaŭ al proponoj por pli forta monda federacio.

La mondanismo troviĝas jam de antaŭ longaj jarcentoj ĉe pensistoj, poetoj, filozofoj kaj kleruloj kiel sopiro al pli homeca mondo. Ni citu nomojn kiel Konfuceo, Zenon, Sokrato, Platono, Sofoklo, Milton, Montesquieu, Thomas Paine, Kant, Victor Hugo kaj Emerson, kaj ni forgesas multajn nomojn.

Inter la jaro 1300 ĝis 1914 ni konas 85 proponojn de mondorganizo. Do, kiel por mondlingvo, mondorganizo ne estas nova ideo. Kio estas nova, kiel por la mondlingvo, tio estas ĝia efektiviĝo en nia dudeka jarcento. Ĝis nia epoko mondlingvo kaj mondfederalismo estis revoj. Subite tiuj revoj fariĝis realaĵoj. Tiurilate ni vivas eksterordinaran epokon. Ni povas diri, ke ni vivas metamorfozon en la homa evoluo. Simile grava metamorfozo okazis, kiam naskiĝis la parolo, kaj poste la skribo kaj pli poste la preso.

Denis de Rougemont en ĵus eldonita libro *Les Chances de l'Europe* [La Ŝancoj de Eŭropo] donas interesajn informojn pri tiuj proponoj. Ni foje ekzamenos ilin.

Ligo de Nacioj naskiĝis la 10-an de januaro 1920. Estas dato, kiun ĉiuj lernejoj devus lerni. Ĝi vivis bone malbone ĝis la 18-a de aprilo 1946 kaj mortis profite al la nova organizo Unuiĝinta Naciaro.

En sia parolado okaze de la ricevo de la Nobel-premio en 1959 Philippe Noël-Baker montras, ke Ligo de Nacioj ludis pacigan rolon, tiom longe kiam Nansen, la delegito el Norvegio, ĉeestis la Asembleojn en Ĝenevo. Lia morto en 1930 bedaŭrinde ankaŭ signifis ekmorton de Ligo de Nacioj, ĉar neniu delegito anstataŭis lin en la lukto por la malarmado. Nansen prononcis verojn, kiujn hodiaŭ remalkovras la delegitoj ĉe Unuiĝinta Naciaro. « *La problemo scii kiel sin liberigi de la milito estas la unua problemo ne nur por la internacia politiko, sed ankaŭ por la nacia politiko* » diris Nansen, kaj li aldonis : « *Se ni konservas niajn armilojn, se ni ne efektivas praktike la laboron, kiun ekkomencis kun tiom da sukceso Ligo de Nacioj por la malarmado, milito certe eksplodos.* » Por Nansen la haltigo de la armada konkurso estis konsiderata kiel la esenca tasko de nia epoko. Dank'al liaj kuraĝaj intervenoj la laboro por la malarmado ekkomencis, sed post lia morto, kaj jam en 1931, ĉar neniu delegito pensis pli alte ol nacie kaj forgesis, ke super la nacioj devas esti la homo, la armada konkurso rekomenciĝis. Ni konas la sekvon !

La rolo de kelkaj homoj sur la evoluon de la historio estas tre granda. Ĝi malpravigas tiujn homojn, kiuj diras : « *Ho kial ekagi, tamen nenio ŝanĝiĝas !* » Multon povas ŝanĝi homo tute sola.

En 1921, por apliki la artikolon 14-an de la Ĉarto de Ligo de Nacioj, estis fondita Konstanta Kortumo por Internacia Justeco. Multaj konfliktoj solviĝis dank'al tiu institucio.

Grupoj fondiĝas por disvastigi la ideojn de mondanismo, libroj ekmontras la neceson federi la popolojn por asekuri la mondan pacon. La plej grava por tiu unua periodo estas la fama *Interpopola konduto* de Edmond Privat, kiu unue aperis en 1931 en la franca sub la titolo *Le Choc des Patriotismes*. Estas Privat mem, kiu esperantigis sian verkon en 1935 kaj poste ĝin tradukis anglan sub la titolo *The Clash of Loyalties*.

Tiu verko de nia samideano restis treege aktuala. Bedaŭrinde ĝi estas elĉerpita, kaj ĝis hodiaŭ ne trovis eldoniston por nova reapero. Edmond Privat multe vojaĝis por diskonigi sian penson. Ĉar li praktikis tri lingvojn, lia penso atingis vastan publikon. Per la angla ĝi estis konata en Usono kaj Commonwealth, per la franca ĝi estis konata en alia granda mondparto, kaj per esperanto ĝi flugis ĝis Japanio kaj Orient-Eŭropaj landoj.

Apud Privat ni citu ankoraŭ kelkajn nomojn de profetoj de la mondanismo. En la franca lingvo disvastiĝis verkoj de Bassot, Belley, Le Foyer Follin *Paroles d'un voyant* [Paroloj de klarvidanto] kaj Bouillet *Comment réaliser la paix* [Kiel realigi pacon]. En la angla aperis verkoj de Lola Lloyd, Rosika Schimines, Streit, kaj en la hispana verkoj de Juan Lauarte.

La apero de la *Korespondado inter Einstein kaj Freud* en 1932 ankaŭ disvastigis ideojn favorajn al mondanismo.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri disvolviĝo de la mondanistaj ideoj. Se tiu temo vin interesas, aŭskultu regule Radio-Svislandon, kaj skribu al ni viajn impresojn.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-